



PILO-PRESS

Internacia

Informservo



Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 22/77 - 2 jun 1977
Aperas ĉiusemajne

Eŭropa Kongreso kun multe da turismo

Paderborn (pp) - 320 esperantistoj el 9 landoj partoprenis la Eŭropan Esperanto-Kongreson, kiu okazis pentekoste en Paderborn. Fakte temis nur pri trilandana kongreso, ĉar oficiale ĝin apogis la landaj Esperanto-asocioj de Luksemburgio, Nederlando kaj Federacia Respubliko Germanio.

Honora Komitato

Al la Honora Komitato de la kongreso membriĝis jenaj personuloj:

S-ro C. Laban Jr., Membro de la Eŭropa Parlamento, Rotterdama

S-ro J.H.C. Molenaar, prezidanto de la Eŭropa Movado en Nederlando

S-ro D.S. Clarke, urbestro de Bolton (ĝemeliĝa urbo de Paderborn), Britujo

S-ro Robert Jarry, urbestro de Le Mans (ĝemeliĝa urbo de Paderborn) Francujo

S-ro Herbert Schwiete, urbestro de Paderborn, F R Germanujo

S-ro J. Girgensohn, Kulturministro de la Federacia Lando Nordrejn-Vestfalia, F R Germanujo

Salutvortoj

Diversaj personuloj de la publika vivo dediĉis al la kongreso salutvortojn. Ni jam publikigis tiun de ĉefministro Heinz Kühn kaj de la ĉefepiskopo de Paderborn.

Ankaŭ la ministro por eksteraj aferoj de F R Germanujo, Hans-Dieter Genscher, dediĉis al la kongreso afablan salutvorton. Ĝi tekstas:

"La Esperanto-asocioj ĉiam aktive klopodis pri la celo al popolinterkompreniĝo.

En sincera aprezo de ĉi tiuj strebadoj mi deziras al la ĉi-jara Eŭropa-Esperanto-Kongreso bonan pason.

Hans-Dieter Genscher

Ministro pri Eksteraj Aferoj de
Federacia Respubliko Germanujo"

Salutvortojn skribajn transdonis ankaŭ la dekanino de la evangelia eklezia distrikto Paderborn, Superintendent Helmuth Koegel-Dorfs, kaj la fondrektorino de la Tuteca Altlernejo Paderborn, Friedrich Buttler, k.a.

Kongresa inaŭguro

Nur 50 minutoj estis antaŭviditaj por la kongresa inaŭguro, sabate, la 28-an de majo. Post enkondukaj vortoj fare de la LKK-estro, d-ro Kassermann, la asociaj prezidantoj D-ro Werner Bormann por GEA, S-ro J. Calado (LEEN) kaj S-ro A. Wickler por LEA salutis la kongresanojn, la lokajn kaj distriktajn reprezentantojn kaj la prezidanton de UEA, d-ro Humphrey Tonkin. En mallonga parolado d-ro Tonkin prezentis siajn imagojn kaj pensojn pri la laŭ li "tri eŭropoj": La Eŭropo de la naŭ, Okcidenta Eŭropo kaj la Kontinento Eŭropo.

Kadra programo

Riĉenhava, varia kaj alloga estis la kadra programo de la kongreso: la kongresa balo, la folkloro vespero kaj la internacia festvespero, kies kulmino sendube estis la magia programo de TRIKSINI el Luksemburgo. Lia magiista majstreco, lia flua perfekta Esperanto kaj lia vivanta kontakto kun la publiko garantiis la sukceson. Ankaŭ la kantoj de gefratoj Kleine, Hövelhof, parte en Esperanto, provokis fortan aplaŭdon. Detala raporto pri tiuj aranĝoj aperos en la venonta numero de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Sed ni ne forgesu mencii la publikan plackoncerton antaŭ la urbodomo, la akcepton ĉe la urbestro, la subĉielan diservon kun sankta meso, celebrita de pastro Hansjörg Kindler (Triksini).

En la kongresejo Paderhalle, situanta en verdaĵa ĉirkaŭaĵo, funkciis speciala poŝtoŝtanco, kiu uzis porokazan poŝtstampon kun Esperanto-teksto (vidu la titolpaĝon!). La poŝtoŝtancistoj estis kontentaj pri sia vendosukceso: Ili vendis poŝtmarkojn en la valoro de kelkaj miloj da markoj. Same funkciis en la kongresejo librostando de Libroservo Ludwig Pickel Nürnberg kaj ekspozicioj pri Esperanto kaj pri Ikonoj de s-ino Katharina Peters Sitnikov.

Kontentaj la kongresanoj estis ankaŭ pri la ekskursoj.

Laboraj kunsidoj

Centra laborakunsido, ekz. pri eŭropaj aferoj, fakte ne okazis. Okazis pli aŭ malpli grandaj kunsidoj kaj kunvenoj pri diversaj temoj, ekz. lernolibroj, Zamenhof-Gesellschaft, GEI ktp.

La por sabata posttagmezo fiksita aranĝo de "Eŭropa Klubo" ne povis kontentigi la aranĝanton kaj kunagantojn. Ja ĝi kaŭzis ĉagrenigon ĉe diversaj flankoj, kaj ŝajne oni maltrafis la temon, kiu ja estis "Ĉu subprivilegio per lingva diskriminacio estas la prezo por Eŭropa unuiĝo?".

Jarĉefkunveno de GEA

Kun granda scivolo kaj streĉo oni atendis la rezultojn de la ĉi-jara ĉefkunveno de GEA, kiun ĉeestis 135 membroj kiuj reprezentis 530 voĉojn.

La ĉefaj diskutpunktoj estis: elekto de nova prezidanto kaj la estonta revuo por la GEA-membroj.

Nu, la revua punkto estis relative rapide solvita. La kunveno akceptis la novan buĝeton kaj per tio ankaŭ la revuon "Esperanto" de UEA.

Malpli rapide kaj malpli facile estis la proceduro pri la elekto de nova prezidanto. Ĉiu proponita kandidato rifuzis kandidati kaj post sufiĉe longa tempo, Heinrich Nischwitz, GEA-trezoristo, prezentis la estraran proponon: S-ino Elsbeth Bormann, la edzino de la ĝisnuna prezidanto Dr. Werner Bormann.

La baloto havis jenan rezulton: Jes 353, ne 58, sindetenoj 118; 1 voĉo ne estis valida.

Kun plimulto do s-ino Elsbeth Bormann estis elektita nova prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. La baloto okazis sekrete per voĉdoniloj.

En la nun naŭkapan estraron oni krome elektis: S-ro Heinrich Nischwitz, S-ro Hermann HeiB, S-ino E. Hirsch, S-ro Richard Hirsch, S-ro Helmut Klünder, S-ro K. Trimborn, S-ro Franz Kruse, S-ro Hermann Behrmann.

Kiel konate, d-ro Werner Bormann, kiu dum 10 jaroj prezidis la asocion, ne plu kandidatis por tiu ofico. La germana esperantistaro devas danki al li, ke li por tiom longa tempo dediĉis sian forton kaj liberan temon al la asocio.

Al s-ino Bormann, la nova GEA-prezidanto, ni gratulas kaj deziras al ŝi forton kaj bonŝancon por ŝia malfacila tasko gvidi la asocion en la evidenta nova, eble eksperimenta epoko!

La venonta germana Esperanto-kongreso okazos en Augsburg, pentekoste 1978, al kiu invitis Esperantogrupo Augsburg.

Honorigoj

Dum la jarĉefkunveno estis transdonita la honora insigno de Germana Esperanto-Asocio "Pro la Merito" al:

S-ro Heinrich Nischwitz, GEA-trezoristo, esperantisto de 1923, kaj

S-ro Ludwig Pickel, iama ĝenerala sekretario de GEA kaj eldonanto de Eŭropa Esperanto-Revuo.

Danko al la LKK

La kongreso estis preparita kaj aranĝita de membroj de Esperanto-Societo Paderborn, kiu ne estas identa kun Esperanto-Centro Paderborn.

La membroj de la Loka Kongresa Komitato estis:

S-ro Dr. H. Kassermann, prezidanto
S-ino T. Lawerino, kasistino
S-ino M. Hardes, membro
S-ro H. Vorsmann, membro
S-ro F. Peters, membro
S-ro R. Ricken, membro

Dankon al ili kaj al ĉiuj ne-nomitaj, ankaŭ familianoj, kiuj kunhelpis al agrabla kaj harmonia paso de la kongreso!

Virina prezidanto ankaŭ por LEEN

La jarkunveno de la nederlanda Esperanto-asocio "La Estonteco estas nia" elektis s-inon A. Uusink prezidanto.

La Luksemburga Esperanto-Asocio kadre de la kongreso okazigis diskut-kunvenon.

Anoncetoj

S-ro Norbert Merkens, Gewerbeschulstr. 44
D-5600 Wuppertal 2, F R Germanio
serĉas la lernolibron "EsperantoSchnellkurs de
Hans Koch". Proponoj petataj!

Bielefelda esperantisto serĉas samideanon cele konversacion kaj korespondadon. Interesuloj skribu al: S-ro Joh. Schalk,
Lipper Hellweg 32, D-4800 Bielefeld, F R Germanio

Esperanto en Radio

Dum la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Paderborn oni multe parolis pri la Esperanto-elsendoj. Oni povis konstati ke la elsendoj estas tre popularaj kaj ekzistas multaj fidelaj aŭskultantoj. Aktivaj aŭskultantoj povis interŝanĝi spertojn.

Ankaŭ dum la kongreso tiuj fidelaj aŭskultantoj aŭskultis al aktualaj elsendoj. Pilo-Press mem povis bone ricevi en Paderborn Radion Varsovia, ORF Wien, Vatikanon.

Bibliografiaj informoj

La libro de la semajno

N.G.M. van Doornik, Francisko el Asizo, Profeto por nia tempo
Esperantotraduko de E.N. Mulders, I.K.U.E-Centro Romo
12 x 17 cm, broŝ., 319 p., prezo 13,80 GM

Aliaj eldonaĵoj

R.L. Stevenson, FORKAPTITA, romano, tradukis el la angla Albert
Goodheir, Eldonejo Kardo, Glasgow 1976
14,2 x 20,5 cm, broŝ., 181 p., prezo 11,- GM

Albert Goodheir, Lingvo kaj Logiko, originala eseo, Eldonejo Kardo,
Glasgow, 10,6 x 18,3 cm, broŝ., 20 p., prezo 1,40 GM

Shakespeare, Epifanio aŭ Kiel vi volas, Esperanto-traduko de
William Auld, Eldonejo Kardo, Glasgow, 1977
14,3 x 20,5 cm, broŝ., 71 p., prezo 8,30 GM

Robindronath Tagor, PRIMICO, poemoj, tradukis Probal Daŝgupto,
Serio Beletraj Kajeroj Stafeto, TK Kopenhago 1977
12 x 18,7 cm, broŝ., 114 p., prezo 12,- GM

William Gilbert, Planlingvaj problemoj, represo de la 1-a eldono 1962,
Serio Beletraj Kajeroj Stafeto, TK Kopenhago 1977
12 x 18,9 cm, broŝ., 99 p., prezo 12,- GM

Daphne Lister, Gis nun, Originalaj poemoj, Esperantaj Kajeroj 1976,
10,5 x 14,7 cm, broŝ., 63 p., prezo 4,20 GM

Marjorie Boulton/ William Auld, RIMLETEROJ, Esperantaj Kajeroj 1976,
10,5 x 14,7 cm, broŝ., 93 p., prezo 5,20 GM

Disko Leviĝis nokte hela sun', religiaj Esperanto-Kantoj, Kantistino
Béby Kohl, Luksemburgo, Eldono de Trixini (Kindler) rapideco 45
prezo 8,- GM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1
Postĉekkonto Nürnberg 819 56-851

Germanlingva Disko kun Esperanto

Berliner Kinderchor (Berlina Infanĥoro) kantas en diversaj lingvoj.
Okaze de sia jubilea koncerto fine de 1975 la ĥoro ankaŭ kantis en
Esperanto. Aperis nun pri tiu koncerto longdaŭra disko (Kaskade 47 503)
sur kiu la 3-a strofo de la konata kanto "Cementino" estas kantata en
Esperanto. Prezo de la disko 20,- GM. La disko havas varban kaj infor-
man valoron por Esperanto, ĉar antaŭ la kantado estas anoncita, ke temas
pri kanto en Esperanto.

Luxemburger Wort pri Esperanto

Luksemburgo (pp) - Dank' al la Triksini-iniciato la gazeto "Luxemburger
Wort" (Luksemburga Vorto) nun regule raportas pri Esperanto. En la
eldono de 27.5.77 sub la rubriko "Esperanto" i.a. estis publikigita
foto pri la vizito de UEA-prezidanto Humphrey Tonkin en Luksemburgo.
Celo de la vizito estis diskutoj pri plano starigi en Bruselo kaj
Luksemburgo Esperanto-oficejojn. La interparolojn ĉeestis Pastro Kind-
ler, s-ino Verena Gass, ges-roj Moon-Nourmont kaj s-ro Wickler de Luksem-
burga Esperanto-Asocio.

PILO--PRESS, ĉiusemajna informservo, jara abono 30,- GM